LA LASTA ESPERO



RUHŞEN DOĞAN NAR

ROKET KİTAP

LA LASTAN ESPERON ĈU NI PERDIS?

KİAM LA SCİENCA OFİCİRO ZA RİGARDİS LA GRANDEGAN KOSMOŜİPON, SİMİLAN AL ĈİELA FORTİKAĴO, Lİ SCİİS, KE Lİ ATESTAS HİSTORİAN MOMENTON. POST TRİ MİL JAROJ DA VOJAĜO TRA LA SENFİNECO, LA GENERACİA KOSMOŜİPO LA LASTA ESPERO FİNE ALVENİS.

SED KİO ATENDİS LİN MALANTAŬ LA SENMAKULAJ MUROJ DE LA ŜİPO? ANSTATAŬ GLORA CİVİLİZO, ZA RENKONTİS NUR LA MUTAN MALVARMON DE ROBOTOJ KAJ LA VOĈON DE LA SAĜULO, LA SUPER-ARTEFARİTA İNTELİGENTECO. KİE KAŜİĜİS LA HOMOJ, LA KREİNTOJ DE TİU Ĉİ TEKNOLOGİA MİRAKLO?

"HOMO SAPİENS ESTAS ESTAĴO KUN MALFORTA MEMORO KAJ TENDENCO FORGESİ."

“EKSTERORDİNARA RAKONTO KAJ KAPTURNA VOJAĜO!”

EMRE BOZKUŞ

ROKET KİTAP

ROKET
KİTAP

Ruhşen Doğan Nar, naskiĝis en 1988 en Izmiro. Li studis Tradukadon kaj Interpretadon en la Universitato Dokuz Eylül. En 2016 li ricevis premion en la konkurso Şerzan Kurt en la kategorio de turklingvaj noveloj. Liaj verkoj estis tradukitaj en multajn lingvojn, inter ili la anglan, italan, azeran, turkmenan, kurdan kaj Esperanton. Li partoprenis en la itale publikigita antologio Futurchia, kiu konsistas el turkaj sciencfikciaj noveloj. Li estas la redaktoro de Roket, la unua turka revuo pri sciencfikciaj noveloj.

Vasil Kadifeli, naskiĝis en 1959 en Istanbulo. Li estas emerita komputila inĝeniero. Li konatiĝis kun la lingvo Esperanto en 2012, relative malfrue, kaj ĝin lernis. Dum sep jaroj li elektronike publikigis la revuon Turka Stelo. Li preparis la biografian kaj poezian traduklibron Nazım Hikmet Ran Poezia Antologio. Li tradukis la lernolibron Esperanto per la Rekta Metodo por turklingvanoj. Li sendis tradukojn al diversaj Esperanto-konkursoj kaj revuoj. En 2019 li ricevis la premion de UEA pro Elstara Agado por la Internacia Lingvo Esperanto.

Ruhşen Doğan Nar

LA LASTA ESPERO

Traduko al Esperanto
Vasil Kadifeli

Preparis por eldono
Emre Bozkuş

La scienca oficiro Za, dum li rigardis la grandegan kosmoŝipon, similan al ĉiela fortikaĵo, grandega domo en la ĉielo, sciis, ke li atestas historian momenton. Ĉiuj oficiroj ĉirkaŭ li estis ekscititaj, sed li estis pli maltrankvila ol iu ajn alia. Lia koro batis forte en lia brusto kiel supernovao preta je eksplodo.

Za estus la unua, kiu paŝus en la generacian kosmoŝipon, La Lasta Espero, vojaĝanta tra la vasteco de la spaco dum pli ol tri mil jaroj, post kiam ĝi alteriĝus. Li faris ĉion por havi ĉi tiun privilegion! Li uzis ĉiujn siajn kontaktojn, flatbabilis kun la ĉefaj figuroj de sia socio, kaj gajnis la fidon de individuoj en ŝlosilaj pozicioj. Za, volante malplenigi sian kapon, turnis sin al sia kolego Od, kiu staris apud li:

"Eĉ kiel eta infano, mi sentis profunde en mia koro, ke ni ne estas solaj en la universo. Kaj rigardu, jen antaŭ ni staras La Lasta Espero! Miraklo malsupreniranta de la ĉielo... Ĝi ankoraŭ ŝajnas nekredebla, sed post duonhoro ni estos vizaĝalvizaĝo kun estaĵoj el alia civilizo."

lta, iomete kurba, kaj tre maldika, Od, sen deturni siajn verdajn okulojn de la kosmoŝipo, simple diris, "Mm-hm... Vi pravas, Za..." Ambicio kaj ĵaluzo ronĝis la internon de Od. Anstataŭ Za, li devus esti la unua persono, kiu eniros la Lastan Esperon. Li estis multe pli supera ol li kaj laŭ sperto, kaj laŭ kapablo. Li estis sufiĉe kolera kontraŭ la Ministerio pri Scienco, kie li pasigis siajn jarojn, kaj kontraŭ tiu ĉioscia, nesperta Za.

Lia kolegino, Âl, maldekstre de li interrompis liajn pensojn kun rideto:

"Za, vi tute ne aspektas ekscitita. Ĉu oni forigis viajn emociojn kirurgie? Mi estus superfeliĉa se mi estus vi. Vi faros historion hodiaŭ. Vi tion scias, ĉu

ne?"

Za eligis laŭtan ridegon el sia koro, poste li metis la manon al la koro kaj diris: "Kiel mi povus ne esti ekscitita? Mia koro batas tiel rapide, ke mi timas, ke ĝi subite haltos. Mi dezirus, ke mi trinkis kelkajn drinkaĵojn antaŭ ol veni ĉi tien. Tio trankviligus miajn nervojn."

Âl elprenis malgrandan flaskon el la grandaj poŝoj de sia pura, blua uniformo:

"Mi ĉiam portas ĝin kun mi. Ĝi estas la fama vino de nia regiono. Drinku kelkajn glutojn. Ĝi tuj malstreĉigos vin..."

Za, palpebrumante siajn okulojn en gesto de neo, rifuzis, dirante, "Ne, iu eble vidos nin. Kaj tiam mi havos problemojn. Oni diros, ke Za estis ebria en tiu grava tago. Dankon ĉiuokaze. Mi promesas, post kiam ĉi tio finiĝos, ni povas eliri kune iuvespere kaj drinki kaj amuziĝi ĝis tagiĝo."

Âl remetante la flaskon en sian poŝon, turnis sian vizaĝon al la ĉielo, kontenta pri la rendevua oferto, kiun ŝi ricevis. Za rigardis la dikan, ŝtipsimilan korpon de ŝi, ŝian ŝvelintan, pastecan vizaĝon, kaj ŝian ĉielbluan hararon. Li estis laŭvorte enamiĝinta al ŝi. Lia haŭto malheliĝis pro feliĉo kiam ajn li rigardis ŝin, kaj li ne povis malhelpi sin je tio. Ĉu povus esti pli klara signo de lia amo al ŝi?

Levante sian kapon al la ĉielo, Za murmuris, "Mi dezirus, ke nia tria okulo estu sur niaj kapoj anstataŭ en la malantaŭo, sur niaj nukoj. Tiel niaj koloj ne streciĝus pro rigardadi al la ĉielo atendante la Teranojn," kaj fiksis sian rigardon al La Lasta Espero.

Ekzakte 1562 jaroj, 3 monatoj kaj 20 tagoj pasis de kiam ni forlasis la Teron, kaj dum tempo pasis aferoj sur La Lasta Espero komencis pli kaj pli malboniĝi. Bedaŭrinde, dum la jarcentoj pasis, homoj komencis forgesi la finan staton de la Tero kaj la kialon ili estis sur tiu generacia kosmoŝipo.

Homo sapiens, la Saĝa homo, estas estaĵo kun malforta memoro kaj tendenco forgesi. La unuaj generacioj naskitaj sur la ŝipo havis glatan vojaĝon ĉar ili kundividis la perspektivon de tiuj, kiuj kreis la kosmoŝipon. Tamen, la samo ne estis vera por la pli postaj generacioj, kiuj sekvis. La mondo estis nur imagaĵo el la pasinteco, troviĝanta nur en la paĝoj de historio. Por ili, Mondo estis nenio pli ol la kosmoŝipo nomata La Lasta Espero.

Novaj generacioj, forgesante sian historion kaj mision, trenis la sorton de La Lasta Espero al simila fino, same kiel iliaj prapatroj iam igis la mondon neloĝeblan. Ŝajne, detruadi estis enradikiĝinta en iliaj genoj, kaj ili ŝajnis ricevi plezuron detruante ĉion ĉirkaŭ si dum ili mem ankaŭ pereas.

Se la malmultaj fortaj, paciencaj kaj inteligentaj homoj, kiuj konstruis La Lastan Esperon, ne estus kreintaj min, la super-artefaritan inteligentecon, la Saĝulon, nia vojaĝo eble finiĝus antaŭ ol pasus 500 jaroj. Ĉar inter homoj, malgrandaj malkonsentoj, debatoj kaj grupiĝoj, kiuj ekestis antaŭ generacioj, kondukis al grava polusiĝo, kvereloj kaj konfliktoj tra la jarcentoj.

Dividitaj en du ĉefajn grupojn, Tradiciistoj kaj Reformistoj, homoj, kiuj iam vagis sur la Tero, fariĝis kiel sovaĝaj bestoj, avidaj verŝi la sangon de unu la alia. Antaŭ 102 jaroj, mi kaj miaj 200 robotoj malhelpis la okazon de Granda Milito sen sangoverŝado.

Dividante La Lastan Esperon en du egalajn zonojn, ni izolis la du sangavidajn loĝantarojn unu de la alia. Robotoj metitaj ĉe la limoj de la zonoj atenteme kaj sukcese malhelpis reciprokajn atakojn okazi.

Estas tragedio, ke la posteuloj de la 2750 homoj, kiuj konstruis ĉi tiun ŝipon por forlasi la ne plu loĝeblan Teron kaj komenci fratan sed penigan vojaĝon, fariĝis malamikoj unu de la alia. Kion pensus la kreintoj de La Lasta Espero, se ili vidus la hodiaŭon? Eble ili eĉ ne ĝenus sin konstrui generacian ŝipon kaj forlasi la Teron.

Antaŭ 54 jaroj, estis 580 Tradiciistoj kaj 251 Reformistoj. Post la unuaj generacioj, plenaj je ĝojo kaj espero, la procento pri fekundeco en la ŝipo komencis malaltiĝi. Dum la jaroj pasis kaj neniu loĝebla planedo aŭ alia civilizo troviĝis, la mensa stato de homoj malboniĝis, kaj ili perdis esperon.

Mia propono pri homa klonado estis malakceptita per la voĉoj de la Tradiciistoj. Kelkaj generacioj poste, la loĝantaro komencis malkreski. Dum la loĝantaro malkreskis, devigitaj sangparencaj geedziĝoj kaŭzis genetikajn problemojn. Kaj poste, antaŭ 54 jaroj, epidemio ekstermis la grandan parton de la loĝantaro.

Mi proponis al homoj vakcinon, kiel solvo por la pandemio; tamen mi estis denove malakceptita. La Tradiciistoj ĉiuokaze neniam fidis min; ili pensis, ke mi estis tiu, kiu unue malsanigis ilin. Sed se mi ne estus stirinta la tutan ŝipon tiom perfekte, ili ne povus vivi eĉ dum unu semajno. La Reformistoj, aliflanke, longe estis enŝlimigitaj en marĉo de profunda nihilismo. Ili diris, ke aŭ vivo, aŭ morto ambaŭ estas la sama afero. Ili ŝajnis jam akcepti sian propran finon.

Kiam la malsano finiĝis, restis nur 51 Tradiciistoj kaj 46 Reformistoj. Nia vasta kosmoŝipo, iam svarmanta je homoj, nun fariĝis mortsilenta tombejo. Tio kaj malĝojigis min, kaj timigis min.

Se la homaro formortus, nek mi, nek La Lasta Espero havus ekzistkialon. Por malebligi ĉi tiun tragikan finon, mi proponis urĝan kunvenon de ĉiuj

homoj. Ĉe tiu kunveno, mi petis ilin flankenmeti siajn malamikecojn kaj trovi manierojn vivi kune. Alie, la homaro falus en la abismon de absoluta formorto, ĉu pro endogamio, ĉu pro alia epidemio, ĉu pro la manko de novaj naskiĝoj.

Kvin reprezentantoj de ĉiu grupo ĉeestis ĉi tiun decidan kunvenon. Ili kunvenis ĉe la Ponto de la kosmoŝipo, iam la ĉefsidejo de La Lasta Espero. Sub la atentemaj okuloj de multaj robotoj, ili sidis ĉe la sama tablo.

Mas, la mezaĝa, barba gvidanto de la Tradiciistoj, leviĝis por komenci la paroladon; sed la Saĝulo, reprezentita kiel fulmadanta ruĝa triangulo sur la grandega ekrano, kiu kovris la tutan plafonon de la Ponto, parolis unue:

"Bonvenon homoj! Mi ne volas perdi vian tempon klarigante denove la kialon de via ĉeesto ĉi tie. Mi nur petas, ke vi parolu respekteme kaj trankvile, kaj mi lasas la parolrajton al vi."

Ankoraŭ starante, Mas etendis siajn maldikajn brakojn larĝe al siaj flankoj kaj komencis paroli:

"Bonvenon al ĉiuj geamikoj! Mi tute konsentas kun la Saĝulo. Ni ĉiuj bone scias, kial ni estas ĉi tie. Se vi demandas min, ni iru rekte al la interkonsento."

La mentoro de la Reformistoj, Ney, maljuna virino en ĉifonaj vestaĵoj, pene stariĝis. La du gvidantoj alfrontis unu la alian rekte. Mas, pro sia malalta staturo, devis levi la kapon por rigardi la alian en la okulojn.

"Jes, mi opinias, ke estus pli produktive por ni diskuti la interkonsenton," diris Ney, rigardante siajn kamaradojn. Ŝi ĵetis sian neĝblankan, kotonsimilan hararon malantaŭen.

"Ni komencu do," konsentis Mas. La aliaj kvar reprezentantoj apud li ankaŭ kapjesis.

La ruĝa triangulo sur la plafono rekomencis ekfulmadi:

"Se vi petas pri mia opinio, por vivi kune kaj konservi ordon, vi devas unue fari komunajn decidojn..."

Mas, kiu portis nigran malstriktan pastran robon, interrompis per aroganta tono:

"Ni jam havas ampleksan regularon bazitan sur la vivo de la Supera Es-

taĵo Kaf kaj nia sankta libro, la Lasta Evangelio. Tamen, mi ne opinias, ke la Reformistoj havas ian ajn ordon aŭ regulojn. Ili preferas anarkiismon kaj kaoson. Tial, mi petas, ke la Reformistoj fariĝu parto de nia morala kaj logika vivmaniero."

Ney eligis surdigan ridegon, kaj larmoj ekplenis en ŝiaj verdaj okuloj pro la forta ridado.

"La persono, kiun vi nomas Supera Kaf, ne estis profeto, sed pura frenezulo. La Lasta Evangelio estis nenio pli ol paĝoj da liaj sensencaj babiladoj. La raportoj de la psikiatroj detale priskribas, ke Kaf estis grave skizofrenia malsanulo. Via tiel nomata morala kaj logika vivo estas nenio pli ol sistemo de sklaveco bazita sur la reguloj de iu frenezulo..."

"Atentu vian buŝon! Vi ne rajtas paroli tiel pri la Supera Kaf!" kriis unu el la Tradiciistoj. "Ne forgesu la centojn da mirakloj, kiujn Li faris sur la kosmoŝipo," aldonis alia. "Pekuloj!" kriis ankoraŭ iu alia.

Ney daŭrigis paroli sen malapero de la rideto sur ŝia sulkiĝinta vizaĝo:

"La aferoj, kiujn vi nomas mirakloj, okazis antaŭ pli ol mil jaroj, kaj strange, nur la vagantoj apud Kaf povis atesti ilin. Eĉ la Saĝulo en La Lasta Espero, kiu vidas ĉion, iel maltrafis tiujn grandajn miraklojn..."

Mas, kun vizaĝo ruĝa pro kolero, diris: "La Ĉiopova Kaf, en la Lasta Evangelio, antaŭdiris la eventojn, kiujn ni travivas nun antaŭ ol mil jaroj. Li avertis nin, ke se ni ne obeus la ordonojn de la Kreinto, katastrofoj konstante trafos nin. Ni devus urĝe reveni al la Tero kun La Lasta Espero. Ni devus elspiri nian lastan spiron sur la Tero kaj esti resurektitaj post la apokalipso. Tamen, ni ignoris la dezirojn de la Kreinto. Ni ne obeis Liajn ordonojn. Ni amasiĝis en kosmoŝipon kaj plonĝis en la mallumon de la spaco sub la jugo de artefarita inteligenteco."

"Kiel vi povas ankoraŭ kredi je la infanaj fabeloj rakontitaj de niaj prapatroj en la Mondo? Kaj vi eĉ transformas taglibron de iu frenezulo al sanktan teks-

ton. Brave!" diris unu el la Reformistoj.

Iu Tradiciisto, tamen, ĵetis sin sur tiun, kriante: "Kiu vi pensas, ke vi estas, nomante Lin frenezulo, vi malmorala fiulo?"

Ĉiuj stariĝis, kaj interpuŝadoj komencis. Dekoj da robotoj intervenis antaŭ ol granda kverelo povis eksplodi. La Saĝulo trankviligis la Ĥaoson. La kunveno rekomenciĝis, sed disputoj eksplodis denove kaj denove. Neniu progreso povis esti farita. Ili eĉ ne povis atingi konsenton pri ununura punkto. La kunveno, kiu daŭris ĝis malfrua nokto, donis neniujn pozitivajn rezultojn. La Saĝulo devis fini la kunvenon, de kiu li tiom multe esperis.

Tradiciistoj kaj Reformistoj daŭrigis siajn vivojn en apartaj regionoj, laŭ siaj propraj ordoj aŭ malordoj.

Portante protektantan veston, kiu kovris ŝian korpon de kapo ĝis piedfingroj, Za, tremante pro ekscito, eniris La Lastan Esperon, nur por esti salutita de ses robotoj anstataŭ homoj. Atendante la varman bonvenigon de homoj dum li eniris la kosmoŝipon, Za pensis al si: "Interese, kie estas la teranoj?"

Iu ruĝa triangulo aperis sur la vizaĝekrano de la plej antaŭa roboto el la ses:

"Bonvenon al La Lasta Espero! Mi estas la Saĝulo, la artefarita inteligenteco..."

"Dankon. Mi estas Za, la scienca oficiro. Mia tasko estas establi la unuan kontakton inter la du civilizoj. Kompreneble, kun via permeso!"

"Permeso estas via! Vi povas sekvi la robotojn. Ili kondukos vin al la Ponto de la ŝipo. Ni povas havi multe pli komfortan konversacion tie."

Za komencis marŝi, ĉirkaŭata de robotoj. La parolanta roboto estis iranta duonmetron dekstre de li. Ili marŝis laŭ longa, hele lumigita koridoro. Za ekzamenis ĉiun detalon ĉirkaŭ si per scivolemaj okuloj. La planko, la muroj, la plafono, la ekranoj, la kabloj... Ĉio estis senmakula kaj perfekta. Sed mankis la plej grava afero: Homo!

"Respektinda Saĝulo," li komencis, parolante mallaŭte, "mi havas demandon por vi. Mi estas ĉe La Lasta Espero jam dek kvin minutoj, sed mi ne renkontis eĉ unu homon. Mia demando estas: Kie estas la homoj?"

Stranga silento okazis. Za rigardis la vizaĝon de la roboto apud li. La ruĝa triangulo restis senmova.

Za sentis sin devigita paroli denove: "Ni unue kontaktis La Lastan Esperon antaŭ monatoj. De tiam, la Ministerio pri Scienco povis renkontiĝi nur kun vi. Vi provizis al ni multajn dokumentojn kaj informojn pri la mondo kaj la

homa civilizo. Ni lernis preskaŭ ĉion pri homoj danke al vi. Tamen, ni neniam povis renkonti homon. Mi eniris la kosmoŝipon kaj ankoraŭ ne vidis eĉ unu homon. Mi demandas denove, respektinda Saĝulo: Kie estas la homoj?"

Ĉiuj robotoj haltis samtempe. La ruĝa triangulo ekfulmis post kelkaj sekundoj:

"Mi komprenas, Za. Mi pardonpetas. Vi neniam antaŭe vidis homojn, kaj kompreneble vi scivolas, kiu kreis ĉion ĉi. Mi intencis montri ilin al vi post kiam ni parolos. Sed ĉar vi insistas, mi ankaŭ povas montri al vi la homojn nun. Nia plano ŝanĝiĝis; ni ne iru al la Ponto. Ni iru al la privata ĉambro, ro-botoj!"

Post kvinminuta promenado, ili atingis la privatan ĉambron. Ili estis en altplafona halo, kiu memorigis grandegan urban placon. Meze de la halo, malproksime unu de la alia, estis du apartaj nigraj kaĝoj. La kaĝoj estis grandaj kiel domoj.

La Saĝulo parolis denove:

"Iam estis homoj, kiuj vivis sur la Tero, kiuj konstruis grandiozan civilizon, sed pro sia avideco, ili nerevokeble detruis la planedon, sur kiu ili vivis, kaj estis devigitaj konstrui generacian kosmoŝipon por forlasi la planedon... Homoj, kiuj vojaĝis dum miloj da jaroj en La Lasta Espero, laŭlonge de la tempo perdis sian vivĝojon kaj esperon pri la estonteco, fariĝis malamikoj unu de la alia, kaj mortigis siajn samspeciulojn sen palpebrumi... Homoj, kiuj travivis malsanojn kaj epidemiojn, kiuj malakceptis miajn helpoproponojn kaj iris obstine al siajn proprajn vojojn, kiuj estis pelitaj al formorto, de ili nur manpleno restis... Homoj, kiuj ne hezitis verŝi sangon eĉ ĉe la rando de ilia formorto, homoj senkoraj kaj senkompataj..."

Za iris al la fronto de unu el la kaĝoj. Malantaŭ la stangoj estis homo, kriante, saltante de flanko al flanko, starante sur ĉiuj kvar piedoj, agante kiel simio. Ĝuste kiel tiu estis homo en la alia kaĝo...

"Jen, tiuj estas la lastaj teranoj!" diris la Saĝulo. "Teranoj, kiuj neniam lernis

de siaj eraroj, kiuj daŭre buĉis unu la alian ĝis la lasta de ili restis, kiuj frakasis mian esperon pri la homaro, kiuj sukcesis akiri de mi vivprizonon, kiujn mi devis enŝlosi en kaĝojn kaj apenaŭ teni ilin vivaj... La inversa evoluado de homoj senigitaj je socia interagado, vivantaj en izoliteco dum jarcentoj. La fina formo de estaĵoj iam sufiĉe inteligentaj por konstrui ĉi tiun grandan kosmoŝipon..."

"La misio de la generacia ŝipo, La Lasta Espero, bedaŭrinde finiĝis per fiasko. La specio de Homo sapiens formortis. Mi povas doni al vi nur ĉi tiujn du simiojn, kies specion mi nomas Homo sapiens retrorsum. Ĉi tiuj du estas ĉio, kio restas de la homaro… Vi povas enŝlosi ilin en bestoĝardenon se vi volas, aŭ sendi ilin al dezerta insulo kaj lasi ilin al siaj propraj rimedoj. La elekto estas via!"